

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri formiĝo de tutmonda publika opinio.

Super la naciaj publikaj opinioj, kiuj permesas la funkciigon de naciaj demokratiaj registaroj, ekformiĝas tutmonda publika opinio, kiu limigas la povon de tiuj samaj naciaj registaroj favore al monda formiĝanta registaro. En nia hodiaŭa elsendo ni ekzamenos kelkajn aspektojn de tiu fenomeno tro ofte prisilentata, sed tamen bone sentata de la registaroj mem.

Kiam tiu tutmonda publika opinio estis ankoraŭ preskaŭ nula, tio estas ĝis la fondo de Ligo de Nacioj en 1920, la regantoj povis facile uzi ĉiujn ajn metodojn por obeigi siajn regatojn. Sed en la Asembleo de Ligo de Nacioj aŭdiĝis iom post iom publikaj kritikoj rilate farojn de iuj registaroj, kritikoj ja ne ĉiam tre objektivaj, sed tamen kritikoj ofte necesaj, por rememorigi al tiuj registaroj, ke super ili ekzistas homrajtoj respektindaj.

Ligo de Nacioj mortis. Hodiaŭ ĝin anstataŭas Unuiĝintaj Nacioj. Tiu organizaĵo estas pli universala kaj pli potenca, ol la mortinta ligo kaj ĉirkaŭ ĝi formiĝas aro de fakaj mondorganizaĵoj, kies morala povo ĉiujare pli kreskas. Se la naciaj registaroj ofte mokas pri tiu morala povo, ili malpli mokas pri la homoj, kiuj en la tuta mondo esprimas sian malkontenton pri tiu neobservo de la decidoj de UN kaj de iliaj fakaj organizaĵoj.

Sed tutmonda publika opinio ne nur formiĝas ĉirkaŭ UN. Jam longe antaŭ 1920 homoj asertis, ke ili ne nur apartenas al sia nacio, sed ankaŭ al la tuta homaro. Hodiaŭ ni nomas tiujn homojn mondcivitanoj aŭ homaranoj. Se ili longtempe predikis en la dezerto, subite dank'al la iniciato de sveda kemiisto, Alfred Nobel, ilia voĉo iom post iom aŭdiĝis. La Nobel-pacpremio jaron post jaro atentigas la homaron pri la konstrua laboro de filantropoj. La Nobel-pacpremiitoj ricevas glorkronon, kiu ilin famigas ĉe la granda publiko. La inventinto de la dinamito montris grandan konon de la homa realeco iniciatinte tiun pacpremion por montri sian naŭzon antaŭ la uzo por militceloj de lia malkovro tiel utila al la progreso de la civilizo. Kaj la elektantoj de la unua premiito montris grandan kuraĝon, kiam ili decidis famigi la aŭtoron de *Rememoroj de Solferino*. Henri Dunant tiam estis mizerulo. Kaj Ruĝa Kruco lin ignoris por plaĉi al la registaroj. En serio de elsendoj ni atente studos la vivon kaj laboron de ĉiuj Nobel-pacpremiitoj. Vi vidos, ke multaj estas herooj, pri kiuj instruistoj devus pli ofte paroli al siaj gelernantoj.

Apud Ligo de Nacioj kaj de la nunaj Unuiĝintaj Nacioj, apud la Nobel-pacpremio, esperanto ludis grandan rolon por la formiĝo de tutmonda opinio. Tion tre bone antaŭvidis Zamenhof mem. Ni citos kelkajn frazojn el lia parolado al la dua universala kongreso en Ĝenevo, kiu okazis en 1906 :

*« Ni ĉiuj konscias tre bone, diris Zamenhof, ke al laboro por esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanis esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. »* Fino de la citaĵo.

Tiuj diroj zamenhofaj hodiaŭ ankoraŭ valoras, kaj ili tre bone priskribas unu el la ideofortoj de la esperantismo. Estas ĉar ĝi estas portanto de tiaj ideofortoj, ke nia lingvo hodiaŭ ludas rolon jam sufiĉe gravan, kompare kun lingvoj parolataj de sama nombro da anoj. Hodiaŭ la registaroj, kiuj deziras diskonigi aŭ advokati siajn farojn antaŭ tutmonda publika opinio, ĉiam pli ofte uzas nian lingvon por tion fari. Tio estas ege instrua por ni. Tio montras, ke nia movado ekreprezentas la tutmondan publikan opinion, tio dank'al sia universaleco kaj diverseco.

Inter la ŝtatoj, kiuj lasttempe plej ofte uzis nian lingvon por diskonigi siajn farojn aŭ plendojn, troviĝas Bulgario, Ĉinio, Okcidenta Germanio kaj Pollando (en alfabeto vico por ne kaŭzi ĵaluzojn).

Mi mencias hodiaŭ ĵus eldonitan verkon. Ĉina Popola Respubliko sendas al la esperantista delegitaro libron titolita *La landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio*. Tiu libro certe bezonas pli longan analizon, ol ĵusan mencion, pro tio en venonta elsendo ni reparolos pri ĝi.

Por hodiaŭ tio, kio nin interesas, estas konstati, ke registaroj trovas profiton en la uzo de nia lingvo por sia nacia propagando. Ili advokatas antaŭ la esperantistaro siajn konfliktojn kun najbaroj, kiel se la esperantistaro estus internacia kortumo. Du gravaj esperantaj organizaĵoj ja havas sian sekretariejon en Hago, Internacia Esperanto-Instituto kaj Universala Ligo, en tiu urbo, kie, sub la iniciato de la caro Nikolao la dua, okazis en 1899 la Unua Konferenco de Hago, konferenco, kiu anoncis nian dudekan jarcenton, kun ĝiaj provoj solvi neperforte internaciajn kverelojn. Tiu Unua Konferenco naskis la hodiaŭan Internacian Kortumon, kiu estus pli potenca, se la popoloj devigus siajn registarojn antaŭ ĝi pli ofte prezenti siajn plendojn, ol tiel rapide uzi minacojn, kiuj komplikigas la solvon de la internaciaj problemoj. Ni estu fieraj, ke nia movado, en la okulo de registaroj, jam estas sufiĉe grava por esti konsiderata kiel influova. Se tio ne estus, tiuj samaj registaroj nin ignorus.

Antaŭ ol prononci juĝon, kortumo aŭdas ambaŭ vidpunktojn. Mi esperas, ke la esperantistaro tiurilate sin montros sufiĉe matura por ne prononci supraĵajn juĝojn, por ne sin lasi kapti de la artifiko de orkestritaj propagandoj. Tio grandparte dependos de la pensa aŭtonomeco kaj kuraĝo de ĝiaj voĉportantoj: la gazetkronikistoj, radioprelegistoj kaj kongresestroj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri formiĝo de tutmonda publika opinio. Se vi havas vidpunkton tiurilate, skribu al Radio-Svislando. Ĝis reaŭdo !

-oOo-